

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Otto Bonte*

1. La luno jam leviĝis,  
Steletoj ekheliĝis,  
Ravante homojn nin;  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvieta,  
Kaj kiel ŝajnas eta  
Krepuska en kovril';  
Por ke vi en ĉambreto  
Samkiel infaneto  
Senzorge dormu en lulil'.

3. Rigardu nun la lunon,  
Vi vidas nur duonon,  
Sed tamen ronda ĝi.  
Ni ofte ion ridas,  
Ĉar ni ne klare vidas,  
Ke ĉie regas harmoni'.

4. ....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Adolf Burkhardt*

1. Leviĝas luno; hele  
orpompas surĉiele  
la steloj al l'okul'.  
Arbaro mute revas;  
el la herbej' sin levas  
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo  
sub la krepusk-vualo  
trankvile kvazaŭ lag'.  
Por vi jen la permeso  
fordormi en forgeso  
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone  
Prezentas sin impone;  
ĝi tamen estas sfer':  
Facile ni priridas  
aferon, se ni vidas  
nur parton de la plena ver'.

4. Homidoj ni fieraj  
pekuloj nur, mizeraj;  
ne multon scias ni.  
Ni teksas iluziojn  
kaj serĉas multajn sciojn  
kaj devojiĝas pli kaj pli.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Guido Holz*

1. La luno nun ekhelas,  
Steletoj oraj belas  
En la ĉiela klar';  
L'arbaro nigra revas,  
Kaj el herbejo levas  
Mirige sin nebula mar'.

2. Silenta estas mondo  
Kaj en krepuska rondo  
Hejmecas kun favor'!  
Similas kalman ĉelon,  
En kiu vi kverelon  
De l'tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?  
Aspekto nur duonas,  
Sed rondas ĝi en bel'.  
Do ankaŭ estas multo,  
Loganta al insulto,  
Okulojn ĝenas la malhel'.

4. Ni homoj tiel vantaj  
Ja estas nur pekantaj,  
Malvasta nia sci';  
Ĥimerojn ni eltrikas,  
Ni multe artifikas  
Kaj perdas celon pli kaj pli.

...

- |   |   |  |
|---|---|--|
| <p>5. ....<br/> .....<br/> .....<br/> .....<br/> .....<br/> .....</p>   | <p>5. Ho Di', nin lasu vidi<br/> la Savon, ne plu fidi<br/> vantajojn de l' pasem'!<br/> Nin faru simpl-animaj,<br/> infane Dio-timaj<br/> en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!</p>            | <p>5. Vidigu, Dio, savon,<br/> Pasem' ne veku ravon,<br/> Ne ĝoju ni pro glor'!<br/> Fariĝu malafektaj<br/> Ni kaj al vi respektaj,<br/> Infane gaju nia kor'!</p>                           |
| <p>6. ....<br/> .....<br/> .....<br/> .....<br/> .....<br/> .....</p>   | <p>6. Vi fine, sen ĉagreni,<br/> el mond' nin volu preni<br/> per milda morto for.<br/> Nin tiam al ĉielo<br/> venigu, al la celo:<br/> Vi, nia Dio kaj Sinjor'!</p>                        | <p>6. Vi gracu, sen ĉagreni<br/> El mondo nin forpreni<br/> Al fin' per milda mort'!<br/> Kaj post forpren' fidele<br/> Hejmigu nin ĉiele,<br/> Sinjoro, Dio, nia fort'!</p>                 |
| <p>7. Ekkuŝu nun, gefratoj,<br/> De bona Di' ŝirmataj<br/> Kun tuta la homar'.<br/> Kar-Dio ne nin punu,<br/> Trankvilan dormon donu<br/> Kaj al malsana la najbar'!</p> <p>...</p> | <p>7. Gefratoj, nun ekkuŝu!<br/> Vin nokta vent' ne tuŝu,<br/> dum ŝirmas anĝelar'.<br/> Indulgu, Di', nin grace,<br/> por ke nun dormu pace<br/> ni kaj malsana la najbar'.</p> <p>...</p> | <p>7. Kuŝiĝu do kun pio<br/> Vi en la nom' de Dio,<br/> Jam fridas nokta vent'.<br/> Per punoj, Di', ne ĝenu,<br/> Per dolĉa dorm' nin benu,<br/> Najbaron ankaŭ en turment'.</p> <p>...</p> |

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de Otto Bonte.*

*Arg-394-779 (2007-03-26 22:31:58)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 15 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Otto Bonte d-ro Dirk Willkommen, la tiama redaktisto de "Esperanto aktuell!", .*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 - †2004-04-02).*

*Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kantlibreto "Mia kantaro I", dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 - †1989).*

*Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*